ESPERANTO ==========

Herzberg, la Esperanto-urbo

Ekde la 12-a de julio 2006 Herzberg uzas oficialan kromnomon „la Esperanto-urbo". Por tio voĉdonis ĉiuj kvar partioj en la Herzberg-a urboparlamento. Poste urbestro Gerhard Walter ricevis centojn da gratuloj el la tuta mondo.

Esperanto-agado en Herzberg komenciĝis en la 1960-aj jaroj, kiam Joachim Gießner [:joahim gisner:] ekinstruis la neŭtralan pontolingvon. Li estis dum 46 jaroj tre aktiva prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio, dum 22 jaroj prezidanto de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj tradukis ĉirkaŭ 400 kantojn al Esperanto. La regiona klubo Esperanto-Societo Sudharco (Südharz) festis en 2001 sian 25-jaran jubileon per kleriga kaj kultura aranĝo kun internacie elstaraj partoprenantoj en la kastelo super la urbo.

Klerigado kaj kulturo estas la precipaj laborkampoj de la Herzberg-aj esperantistoj. Interkultura Centro Herzberg funkcias interalie kiel filio por klerigado kaj kulturo de la Germana Esperanto-Asocio kaj klerigcentro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Dum la tuta jaro okazas Esperanto-kursoj, pluklerigaj studsesioj, fakaj kursoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj. Herzberg estas germania kaj internacia centro por klerigado de Esperanto-instruistoj.

Speciale sukcesa estas la apliko de Esperanto por vigligo de ĝemelurbaj kontaktoj inter Herzberg kaj Góra en Pollando. En aprilo 2005 la urbestroj Gerhard Walter kaj Tadeusz Wrotkowski interkonsentis uzi Esperanton kiel neŭtralan pontolingvon. Esperanto estas instruata en la lernejoj de ambaŭ urboj. En aŭgusto 2006 okazis per Esperanto la unua renkontiĝo de lernantoj el Herzberg kaj Góra en arbara junular-feriejo en Herzberg-Pöhlde. Similaj renkontiĝoj, kun eĉ pli internacia partoprenantaro, okazos laŭplane en ĉiu somero. Ni ŝatus, se Herzberg fariĝus Esperanto-modelurbo kun dulingvaj vojmontriloj, manĝokartoj en Esperanto kaj multaj aliaj ofertoj por esperantistaj gastoj. Unuaj paŝoj al tiu celo jam videblas: multloke vojmontriloj gvidas al „Esperanto-Centro", kaj la restoracio sur monto „Großer Knollen" en januaro 2007 surtabligis la unuajn Esperanto-manĝokartojn de la Esperanto-urbo.

Informas pri Esperanto en Herzberg:

Interkultura Centro Herzberg

Grubenhagenstr. 6 -- 37412 Herzberg am Harz -- Germanio

telefono: (0 55 21) 59 83 mobila t.: (01 62) 9 89 31 42

esperanto-zentrum@web.de

www.esperanto-zentrum.de

PORTUGALA ==========

Herzberg, a cidade-esperanto

Desde 12 de Julho de 2006, Herzberg usa o epíteto oficial "a cidade-esperanto". Votaram para esse efeito favoravelmente todos os quatro partidos da Assembleia Municipal da cidade de Herzberg. Depois, o presidente da autarquia Gerhard Walter recebeu centenas de reconhecimentos de todo o mundo.

As iniciativas relativas ao esperanto em Herzberg começaram nos anos sessenta, quando Joachim Gießner começou a ensinar a língua-ponte neutral. Ele foi durante 46 anos um presidente muito activo da Associação Ferroviária Esperantista da Alemanha, durante 22 anos foi presidente da Federação Internacional dos Ferroviários Esperantistas e traduziu cerca de 400 canções para esperanto. O clube regional Sociedade Esperantista Sudharco (Südharz) festejou em 2001 o seu 25º aniversário com um arranjo cultural e formativo, no qual participou um público eminente internacional, no castelo da cidade.

Formação e cultura são os campos de actividade principais dos esperantistas de Herzberg. O Centro Intercultural Herzberg funciona, entre outras actividades, como filial de formação e cultura da Associação Alemã de Esperanto, e como centro de formação da Liga Internacional de Professores de Esperanto. Todo o ano, há cursos de esperanto, sessões de estudo de formação, cursos especializados e outros arranjos esperantistas. Herzberg é um centro alemão e internacional para a formação de professores de esperanto.

Especialmente bem sucedida é a aplicação do esperanto para tornar viva a geminação das cidades Herzberg e Góra, na Polónia. Em Abril de 2005, os presidentes autarcas Gerhard Walter e Tadeusz Wrotkowski combinaram usar o esperanto como língua-ponte neutral. O esperanto é ensinado nas escolas das duas cidades. Em Agosto de 2006, deu-se o primeiro encontro de estudantes de Herzberg e Góra, utilizando o esperanto, num campo de férias de jovens em Herzberg-Pöhlde. Encontros semelhantes, com uma participação até mais internacional, ocorrerá este Verão, como está projectado.

Gostaríamos que Herzberg se tornasse uma cidade esperantista modelo, com sinalização em duas línguas, ementas em esperanto e muitas outras ofertas para visitantes esperantistas. Os primeiros passos para esse objectivo já se vêem: em muitos lugares já se vê sinalização que indica o Centro de Esperanto; e o restaurante sobre o monte Großer Knollen, em Janeiro de 2007, colocou sobre as mesas as primeiras ementas em esperanto da cidade-esperanto.

Informações sobre o esperanto em Herzberg:

Interkultura Centro Herzberg -- Grubenhagenstr. 6 -- 37412 Herzberg am Harz -- Alemanha

telefone: (0 55 21) 59 83 telemóvel: (01 62) 9 89 31 42

esperanto-zentrum@web.de www.esperanto-zentrum.de

traduzido do esperanto por ***João José Santos***
Portugal, 2007-09-26
joaojosesantos@gmail.com